Partoprenu en projekto de nova internacia lernolibro

fariĝu testanto!

Tri personoj komencis labori super projekto de nova Esperanto-lernolibro, subtenata de la franca landa asocio (UFE). Nia intenco estas proponi al la Esperanto-instruistoj, kiuj deziras apliki aktualajn metodojn, taŭgan kaj allogan materialon.

Jen ni prezentas la ĉefajn punktojn, kiuj karakterizas nian projekton:

- ĝi estos **internacia –** t.e. uzebla en kiel eble plej diversaj naciaj kuntekstoj. Ĝi estos tial verkita tute en Esperanto (sen nacilingvaj adaptoj).
- ĝi estos **por plenkreska publiko** – t.e. taŭga ekde proksimume la 16-jara aĝo.
- ĝi estos **por komencantoj** kaj kondukos ilin ĝis la nivelo B1.
- ĝi estos specife planita **por grupa instruado** (do netaŭga por memlernado).
- ĝi estos **konforma al la KER-ekzamensistemo**.
- ĝi estos **moderne dezajnita**, kaj ilustrita per koloraj bildoj kaj fotoj.
- ĝi elmetos la lernantojn al **vivanta lingvo** pere de diversaj vidaj kaj sonaj dokumentoj, ĉerpitaj precipe el la Esperanta mondo.
- ĝi instigos la lernanton al **aktiva lernado**, en kiu ili mem trovu la regulojn de la lingvo per observado, cerbumado kaj ĝeneraligo surbaze de ekzemploj.
- ĝi instigos interhelpadon kaj kunlaboradon kaj motivos ilin proponante **la realigadon de projektoj**.


C. Aktivaĵoj

1. **Redaktado:**
Vi ĵus aliĝis al esperantlingva forumo. Skribu mesaĝon por prezenti vin al la aliaj esperantistoj.

2. **Parola esprimado en duopo:**
Prezentu vian plej bonan amik(in)on: diru lian/ŝian nomon, kie li/ŝi loĝas, kiu estas lia/ŝia profesio, k.t.p.

Post periodo da maturiĝo tiu projekto eniris sian fazon de verkado, kaj ni baldaŭ bezonos testigi la materialon. Ni do serĉas homojn, kiuj gvidas kursojn en plej diversaj landoj kaj kuntekstoj, por komenci la testadon **en Oktobro 2015**. La testantoj estu pretaj raporti detale pri la testado, por ke ni povu konsekvence plibonigi la materialon kaj prepari la finan version.

Se nia projekto interesas vin, ni invitas vin kontaktiĝi kun ni kiel eble plej frue.

Kristof (aŭtoro)

retadreso:
ch.chazarein@gmail.com

profilpaĝo ĉe Edukado.net:
kristof

Marion (aŭtoro)

retadreso:
marion.quenut@laposte.net

profilpaĝo ĉe Edukado.net:
Marqnt98

Axel (kunordiganto)

retadreso:
axel.rousseau@esperanto-france.org

profilpaĝo ĉe Edukado.net:
Axel584